



NADIA

Danke al iu strangaĵo, kiun havas la sociaj retoj – kaj al la superba polica memoro, kiun ili konsistigis per la informoj, kiujn ni volonte transdonas –, fejsbuko memorigis min pri vojaĝo farita antaŭ kelkaj jaroj al Suda Kurdio⁽¹⁾. El Amedo, ĉefurbo de Norda Kurdio⁽²⁾, ni iris al la urbo Ĝiziro⁽³⁾. Noktiĝis je la alveno en la ĝizira ebenaĵo, sed belan feston estis aranĝintaj kelkaj gejunuloj ĉe amiko. “Tie ĉi ne parolu turke”, oni diris al mi je la alveno; ili estis lernantoj pri medicino kaj farmacio en Ankaru, kaj, super io ajn, aktivuloj por la kurda lingvo. Poezio kaj kanto kun brando kaj gitaro miksiĝis en tiu nokto, kiel en la antikvaj rakontoj de Mezopotamio.

Sekvontage, oni portis min al la tombo de Mem kaj Zin⁽⁴⁾. “Mem kaj Zin” estas kurda epopeo de la 17-a jarcento, kaj la sekvintan jaron ni prezentis ĝin eŭskigitan en la Foiro de Durango⁽⁵⁾. La festo en Ĝiziro okazis apud la rivero Tigriso, kie, laŭ ĝi oni desegnis, preskaŭ jarcenton antaŭe, la landlimojn de Sirio, Irako kaj Turkio, disigante tiel kurdajn kvartalojn kaj familiojn. Kaj kune kun la kurdoj, milojn da asirianoj, armenoj kaj alietnanoj.

Transpasinte la landlimon kun Irako, en la urbo Zaĥo⁽⁶⁾, kie la kurdaj koloroj ĉieis, sentiĝis la libereco kompare al la sufokiga ĉeesto de militistoj en Ĝiziro. De tie ni iris al la provinca ĉefurbo, Dihoko⁽⁷⁾, kaj ĝis Laliŝo⁽⁸⁾. La kurda flago estis pentrita sur la montoj, same kiel la suno, kiun reprezentas la fajroj ĉiujare en marto; ĝi estas grava elemento, kiun adoras la kurdoj kaj aliaj popoloj. La jazidoj estas la kurdoj, kiuj konservis la kredon de antaŭ la islamo. En Laliŝo miloj da jazidoj kutimas fari pilgrimon aŭtune, kaj samtempe ankaŭ alvenis ni. Nudpiede ni paŝis apud tiuj miloj da jazidoj, kiuj nin invitis eniri la templon de Ŝejko Adi⁽⁹⁾, tra la pordo kun bildo de la serpento.

Mi memoras ĝin kiel belan tagon, eĉ se tiam ilia vivmaniero malfacilis; du jarojn antaŭe, 500 homoj mortis en atenco kontraŭ la jazidoj. Transe de la landlimo, restis preskaŭ neniu sekvanto de la praepoke majoritata religio de la kurdoj: kune kun la armena kaj asiria genocidoj, kune kun la etna purigado de la grekoj, Turkio restis ankaŭ preskaŭ sen jazidoj – restas nur kelkaj miloj, kaj, feliĉe por mi, unu el ili estis la kurda aktivulo, kiu luis al mi apartamenton en Istanbulu –.

Ili bone sciis, kian prezon pagis iliaj prauloj al la sekvantoj de la islamo. Sed neniu povis imagi tion, kio estis alvenonta. Nadia Murad⁽¹⁰⁾ difinas ĝin tiel: “Mi estis kamparana knabino, kiu vizitis la lernejon de mia vilaĝo, kaj subite mi estiĝis seksa sklavo de la Islama Ŝtato, propraĵo de ties partianoj.” Kvar jaroj pasis, de kiam la Islama Ŝtato konkeris Ŝingalon⁽¹¹⁾ kaj efektivigis

genocidon kontraŭ la jazidoj. “Kion mi plej malfacile povas akcepti, estas, ke la mondo rigardis, sed faris nenion”, ŝi memoris dum tiuj ĉi tagoj. Sufiĉas nur trarigardo en niaj gazetotekoj pri tiu 2014 kaj la protestoj en Eŭskio: aperas Gazao, sed neniu protestis por denunci tiun genocidon, okazantan vidalvide.

Tiu ĉi semajno komencas la adiaŭo de Angela Merkel. Ŝi forlasos unue la prezidentecon de la *CDU*(12), kaj poste la kancelierecon; ĉio laŭ plej orda maniero. La bildo de la semajno estis tiu de la renkonto inter Murad kaj Merkel, antaŭ la *CDU*-partikongreso. La plej elstara brilaĵo, kiun postlasos la kanceliero, inter ŝiaj ombroj, estos sendube la akcepto de la rifuĝintoj kaj la protekto kaj prizorgo de la jazidoj, viktimoj de la plej granda brutalaĵo.

Nadia Murad estos morgaŭ en Oslo por ricevi Nobelpremion pri Paco. Unu el la miloj da viktimoj de la masklisma fanatikeco, same kiel antaŭe Malala Yousafzai. La pakistanino substrekis la gravecon de la kulturo kaj eduko por potencigi la virinojn. Nadia Murad substrekas la neceson rekonstrui Ŝingalon, ĉar tiu estas la maniero, por ke la islama faŝismo ne venku: rekonstrui, kion ĝi detruis, kiel ni diras kelkfoje, “oni ne diru, ke tiu estis iama popolo”. Ĉar jaron post jaro, la mezopotamia mozaiko pli malriĉas. Kaj en Ŝingalo estas multo en la ludo, interalie ĉar multaj rifuzis esti genocidviktimoj kaj formis sian feminisman – kaj jazidan – milicon, IPT kaj IPTŜ(13). Nepra potencigilo estas la kulturo. Kaj kune kun la denunciado pri la uzo de la virinkorpo kiel militilo oni devas aplaŭdi kaj impulsi la feminisman memdefendon kiel omaĝon al tiuj knabinoj, kiuj estis en la unua batallinio defendante la mondon de la fanatikeco.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Suda Kurdio/Başûrê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (2) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.
- (3) Cizîr.
- (4) Mem û Zîn
- (5) *Durangoko Azoka*. en la eŭska. Ĝi estas ĉiujara librofoiro pri la eŭska literaturo.
- (6) Zaxo.
- (7) Dihok.
- (8) Laliş
- (9) Şêx Adî.
- (10) Nadiye Murad Besê Taha.
- (11) Ŝingal.
- (12) Christlich-Demokratische Union Deutschlands. Kristandemokrata Unio de Germanio.
- (13) Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê) kaj Inaj Protekt-Taĉmentojn de Ŝengalo (Yekîneyên Parastina Jin ê Şengalê).

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Urtzi Urrutikoetxea.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 9-an de Decembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Januaro 2019-a. Provlegis: DS.

